

BIBLIOTEKO FRANCISKO VALDOMIRO LORENZ EN ĈEĤIO

La 8an de julio okazis grava evento en la komunumo Vrdy (Ĉeĥio), al kiu nun administracie apartenas Zbyslav, la naskiĝvilaĝo de František Vladimír Lorenc (ĉeĥa formo de F. V. Lorenz).

La loka biblioteko portas ekde la 1a julio oficialan nomon “Knihovna Františka Vladimíra Lorence Vrdy” (Biblioteko Francisko Valdomiro Lorenz Vrdy), kaj dimanĉe, la 8an de julio, okazis senvualigo de la memortabulo pri F. V. Lorenz sur ĝia ekstera muro, produktita fare de la skulptisto kaj esperantisto Zdeněk Myslivec. La publiko konsistis el proksimume 100 personoj. El Brazilo salutis la ĉeestantojn la ĉeĥa ĝenerala konsulo el San-Paŭlo, s-ino Pavla Havlíková.

Post la enkondukaj vortoj de la urbestro Antonín Šindelář, la bibliotekistino Pavla Kobelová prezentis honorajn gastojn kaj skizis la programon de la posttagmezo. Sekvis prelego de Petro Chrdle pri la vivo kaj verko de F. V. Lorenz kun legitaj fragmentoj el la libro pri Zamenhof (estis cititaj Lorenz mem, el sia letero al fratino, lia amiko, kaj s-ino Novinski, eksa estro el la Muzeo de enmigrintoj en Dom Feliciano), kaj Pavla Dvořáková prezentis sian mur-ekspozicion pri F. V. Lorenz, kiu restos en la koridoro de la biblioteko. Post salutvortoj de sinjorino Havlíková, prezidantino de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj Asocio de Handikapitaj Esperantistoj, oni menciis skribajn salutojn (inter ili ankaŭ la

viajn, sed ankaŭ de la pranepo de F. V. Lorenz, la ĉeĥa honora konsulo en Porto Alegre). Ĉiuj ĉi, kun la tradukoj, estis surtable por rigardo kaj restos konsulteblaj en la biblioteko.

Sekvis la propra senvualigo de la memortabulo fare de la konsulino el San-Paŭlo kaj urbestro de Vrdy, la tosto kaj refreŝiĝo, dume en prelegĉambro estis ripete projekciita ĉeĥe dublita 14-minuta brazila filmo pri Lorenz, kaj oni povis ankaŭ konatiĝi kun la libroj de la eldonejo Kava-Pech. Plej granda intereso estis kompreneble pri la libro de Vlastimil Novobilský, Francisco Valdomiro Lorenz: atesto pri la vivo kaj verko de eksterordinara homo, ne nur pri ĝia ĉeĥa versio, sed vendiĝis eĉ kelkaj en Esperanto.



Eta Ŝipo Surmaren Ĵetita

Raymundo Souza



Mi estas eta ŝipo surmaren ĵetita,
Kiel la nuboj en la ĉielo.

Mi estas simile senatenta fiŝeto
Kiu de la logaĵo estas tentata.

Mi sentas min kiel kaheloj

Kiun ĉiuj admiras, sed ilian brilon eltiras.

Mi estas kiel kantema birdo,

Kiun ĉiuj volas arestita.

De'! eta ŝipo mi havas la malfortecon,

De la nuboj mankas al mi la malpezeco,

De'! fiŝeto mi havas la naivecon,

De la kaheloj mi havas la piedsignon,

Kaj de'! kantemaj birdoj mi havas nenion.



LORENZ

KUNLABORU! – Membriĝu ĉe ASOCIO LORENZ kaj helpu la devastigon de Esperanto kaj Spiritismo en la tuta mondo!

COLABORE! – Torne-se membro da ASSOCIAÇÃO LORENZ e auxilie a divulgação do Esperanto e do Espiritismo em todo o mundo!